

En ĉi-pria letero Prof. W a r i n g h i e n referis al „*Lingvaj Respon-
doj*” 3a eldono, p. 50-51, konkludante ke senvaloraj estas ekzemploj el
la unuaj jaroj [antaŭ 1891]. Komento pri ĉi tiu punkto troviĝas en la
Plena Gramatiko (2a eldono, § 297). Pri la kompleksa karaktero de la
nombronomoj vidu la *Plenan Gramatikon*, 3a eldono, § 87.

632.937.1(51)

INSEKTOJ KONTRAŬ INSEKTOJ

de LU Chin-sheng

Estas multaj plagoj en agrikultura produktlaboro, el kiuj la agado
de malutilaj insekto ofte kalkuliĝas kiel la plej danĝera, ĉar ili povas
en tre mallonga tempo formanĝi la tutan foliaron aŭ alian parton de la
plantaĵo. Oni devas elpensi metodojn por defendi siajn rikoltojn.

En Ĉinio post liberiĝo en 1949, sub la zorgado de la Ĉina Komunista
Partio kaj la Popola Registaro, oni tuj komencis kontraŭbatali la
plaginsektojn, kiujn la Kuomintanga Registaro malsukcesis aŭ simple
neglektis subigi. Ni akiris seriojn de grandaj sukcesoj en nia laboro kaj
la rekta rezulto estas, ke nia rikoltkvanto multe pliigis. Plantaĵpro-
tektado jam nun fariĝis unu el la „Ok Leĝoj de Agrikulturo”.

Aparte de la hemiaĵoj, ni ankaŭ grandskale utiligas la biologian
metodon, t.e. parazitajn kaj aliajn insektomanĝantajn insektojn en
servo al nia celo. Ni mobilizis ĉiujn por elradiki la plagojn.

Inter la parazitaj, ni jam utiligis *Trichogramma evanescens* West-
wood (por *Pyrausta nubilalis* Hübner, *Chilo suppressalis* Wlk., kaj
aliaj fiinsektoj el familio *Pyraustidae*), *Dibrachys cavus* Wlk. (por tra-
vintrantaj larvoj de *Platyedra gossypiella* Saunders) en kotontenejo.
Aphelinus mali Haldeman (por *Eriosoma lanigerum* Hausm.) kaj aliajn.
Inter la karnivoraj insektoj, ni jam utiligis *Rodolia rufopilosa* Muls.,
R. cardinalis Muls. kaj *Cryptolaemus montrozieri* Muls. por kontraŭ-
batali la kokcidon *Icerya purchasi* Maskell. En tiu ĉi lukto ni rikoltis
rimarkindajn sukcesojn. Tamen ni ne preterlasis la utilajn mikrobojn.
En nia laboro elradiki la sojinsekton *Grapholitha glycivorella* Mats.
ni sukcesis mobilizi la fungon *Beauveria bassiana* (Bals.) Vuill. Sendube
ni utiligos pliajn fortojn el ĉi tiu kategorio.

— Adreso: Lu Chin-sheng, Nordokcidenta Kolegio de Agrikulturo,
Wukung, Shensi, Ĉinio.

408.92(081) (E(081))

Gaston W a r i n g h i e n: **Lingvo kaj Vivo**. Esperantologiaj Eseoj.
N-ro I de nova serio de Stafeto: „Movado”. 450 p., 22 × 16 cm².
Prezo: \$ 4,00 por bindita, \$ 3,40 por broŝurita ekzemplero.

Ĉi tiu libro de nia eminenta esperantologo, Prof. W a r i n g h i e n,
dediĉita „memore kaj honore al Lazaro L. Z a m e n h o f, apostolo de la
paco, 1859-1917” - (se oni nepre volas uzi romajn ciferojn, oni faru tion
korekte) - estas vera frandaĵo por esperantistoj kiujn interesas ilia ling-
vo. La libro konsistas el 3 partoj: **I. Nia Lingvo, II. Niaj Problemoj, III.
Niaj Perspektivoj**. Inter ni la partoj I kaj III ne kaŭzos disputojn, kio ne
signifas ke ili ne estas ege interesaj kaj pensigaj. La disputojn kaŭzas,
kompreneble, niaj *problemoj*.

En la unua parto la aŭtoro analizas plurajn fragmentojn de *praes-
perantoj* el 1878 kaj 1881 por eltrovi la vojon laŭ kiu Esperanto fariĝis
kia ĝi estas. Montriĝas, ekzemple, ke akuzativo tiam tute mankis aŭ
nur troviĝis ĉe pronomoj. Nur en unu fragmento (de *La Rabistoj* de
Schiller) Z a m e n h o f provis akuzativan finaĵon (l) ankaŭ ĉe
substantivoj kaj adjektivoj, proksimume kiel en la nuna Esperanto. En
aldona noto W a r i n g h i e n donas ankoraŭ tri variaĵojn de „*Patro
nia*” el 1894 - la tempo de la reformproponoj - kaj analizas ilin.

La dua eseo titoliĝas: *Etimologiaj Esploroj*, kaj interesos ĉiujn, kiuj
interesiĝis pri la artikolo de s-ro G r e g o r en Sc. R. 9 92 pri „La Fon-
toj de Esperanto”. La tria eseo, „*La Fundamento de Esperanto*”, havas
du partojn: *I. Historia Aspekto*, kaj *II. Vortkonstrua Signifo*, nombras
28 paĝojn, estas tre grava kaj donas multe pli ol sugestas la titoloj. W.
montras ke en nia hodiaŭa Esperanto troviĝas formoj kiuj devenis el
diversaj stadioj de la estiĝo de nia lingvo. Li montras kiel Z a m e n h o f
strebis al mallongeco de la radikoj kaj al evito de homonimoj (io pri kio
pli atentu la hodiaŭaj kaj estontaj kreantoj de novvortoj!), kaj ke tio
kondukis al devioj disde la fontolingvoj. Siavice tio kondukis al kritikoj
kaj reformproponoj. Tamen la juna lingvo - ankoraŭ ne havante tra-
dicion devigantan al respekto - bezonis stabilecon. Z a m e n h o f-on
evidente inspiris la ekzemplo de la Malnova Testamento - la netuŝebla
libro kiu kuntenadis la hebrea genton tra la jarmiloj, kaj li efektive
sukcesis garantii la stabilecon de Esperanto per la solena akceptigo de
la Fundamento en Bulonjo-ĉe-Marco en 1905. Post tio W. analizas la
sorton de la Fundamentaj vortoj en la evoluo de la lingvuzo. Mi estas
tentata citi el ĉi tiu parto - sed ĉar mi estas same tentata citi el multaj
aliaj partoj, mi provos rezisti al la tento. Vi aĉetu mem, legu, studu
mem ĉi tiun majstran libron.

La kvara eseo, titolita „*La Originala Strukturo de Esperanto*”, havas
jenajn partojn: *I. La Vorto*, kaj *II. La Frazo*. Ĝi estas ege interesa
kaj multe helpas nin pli bone kompreni la esencon de nia lingvo, kiu
- malgraŭ la ŝajno - fundamente diferencas de la hindo-eŭropaj lingvoj.

412.021

E 223

E 221.1

E 221.2

E 20

Esperanto estas konstruita kiel kodo. Tio signifas, ke Z. devis submeti la elekton de la vortoj al tri nepraj kondiĉoj: 1) ke ĉiu lingva elemento estu senŝanĝa kaj memstrara; 2) ke ĉiu elemento estu nekonfuzebila kun iu ajn alia, forme aŭ sence; 3) ke ĉiu elemento povu kuniĝi, laŭbezone, kun ĉiu ajn alia. Ĉi tiuj tri kondiĉoj - kiel montras W. - profunde influis la konsiston de la lingvo. W. tiam analizas la sekvojn de ĉi tiuj tri kondiĉoj. Ĉe tio li citas i.a. ege interesan, sed - bedaŭrinde - ne imititan ekzemplon de Grabowski el 1890(!): „Tial mi nun devas sidi kaj deziri, ke l' o plej malbona fariĝu, por ke mi ricevu mian monon?”

E 551.4

E 54

E 519

E 583.4

E : 410.7

W. retrovas trajtojn de la vortstrukturo Esperanta en ĝia frazostukturo. Iom pli longaj frazoj konsistas el pli-malpli memstaraj partoj kaj „montriĝas la tendenco limigi la fenomenojn de akordo [de nombro, kazo, verbaj modo kaj tempo, refleksivo] al la baza nedisigebla parolunuoj triterma: aŭ subjekto-predikato-objekto, aŭ subjekto-kopulo-predikativo; kvazaŭ ĉia aldonaĵo al tiu tritermaĵo emus konsistigi per si mem novan parolunuon, tenantan kontraŭ la alia relativan memstarecon. Tiel ke la malsimpla propozicio prezentas serion da parolunuoj, metitaj unu apud la alia, en maniero, kiu ne povas ne memori al la observanto la liniecan strukturon de la malsimpla vorto.” (p. 127).

La kvina eseoj - jam aperinta en *Esperantologio* (1949) kaj en *La Progresanto* - temas pri „La Akuzativo en Interlingvistiko” kun jenaj partoj: I. La Akuzativo, II. Avantaĝoj kaj Malavantaĝoj de la Akuzativo, kaj II. Kial Esperanto havas Akuzativon, kaj la sesa eseoj pri „La Akuzativo en Esperanto” kun jenaj partoj: I. La Objekta Akuzativo, II. La Direkta Akuzativo, III. La Adjekta Akuzativo, kaj IV. La Lingvistika Valoro de la Akuzativo. Ĉi tie W. bone montras ke por I. L. - kiu estas (preskaŭ) nenies gepatra lingvo - laŭebla klareco kaj nedubesenceco estas eĉ pli grava ol por lingvo nacia, kaj ke pro tio fonetika morfemo estas necesa. Li ankaŭ majstre klarigas ke, kvankam sendube estas eble krei lingvon kiu diversajn kazojn ne havas kaj ne montras la objekton per fonetika morfemo, Esperanto ne povus malhavi ĝin sen plene perdisian karakteron. La akuzativo en Esperanto estas esenca - ne ia akcesora - trajto de ĝia karaktero. Pli bonan advokaton nia n-kazo certe ne povus trovi ol ĉi tiun francan lingviston, kiu en sia nacia lingvo ne havas ĝin kaj per multaj ekzemploj (francaj, okcidentalaj, nederlandaj) montras la dubesencecojn kiuj rezultas el nehavado de akuzativo. I.a. li montras kiel unu sesvorta frazo en *Occidental-Interlingue* havas 6 malsamajn signifojn pro tio ke tiu lingvo ne havas akuzativon, nek distingas inter is-tempo kaj it-participo. Statistiko montras ke meze 8 ĝis 10 procentoj de normala Esperanta teksto estas akuzativaj, sendepende de la aŭtoro, kaj ke la uzo de la akuzativo montras nenian tendencon malpliigi.

E 516

La dua parto de la libro certe kaŭzos inter ni multajn diskutojn kaj eĉ disputojn. La unua eseoj traktas la landnoman demandon - ĝiajn Esperantan, internacian kaj politikan aspektojn, kaj konkludojn. Pri ĝi mi volas fari nur kelkajn rimarkojn. La formoj kun -i- estas nur laŭ sia skriba aspekto internaciaj. En la pli multaj lingvoj kun similaj formoj la akcento ne estas sur tiu i, sed sur la silabo antaŭ ĝi. Se oni devas mencii tutan serion da landnomoj, kaj ĉiuj aŭ preskaŭ ĉiuj finiĝas per „-io” kun akcenta i, tio - laŭ mia gusto - malplaĉas. Aliflanke - se ni volas havi gente neŭtralajn landnomojn, ni devas forlasi la uzon de landnomoj kun -uj-. Tamen, tiukaze la simpla anstataŭigo de -uj- per -i- ne prezentas solvon. Maloportunaĵo estus, ke la nomo de loĝanto de iu lando (kaj la responda adjektivo) estus pli longaj. Koncerne la politikan aspekton mi rimarkigu, ke, kvankam estas tendenco nomi iun landon tiel, kiel la loĝantoj mem nomas ĝin - tio ne ĉiam okazas. Sufiĉas mencii Japanujon, kiun oni en aliaj lingvoj ne nomas *Nippon* aŭ *Ni(h)-hon*. Koncerne la „internacian kompreneblecon” mi rimarkigu jenon: povas esti ke por la franca poŝtisto de s-ro W. *Danujo* ne estas rekonebla; mia sperto estas ke la Esperantaj landnomoj ĉe la poŝto en Nederlando kaŭzas neniam malfacilaĵojn. Mi skribas sur Esperantajn leterojn eksterlanden la nomon de la lando ĉiam nur en Esperanto. Se oni timas nekomprenon, oni aldonu la nomon en la lingvo de la lando el kiu oni ekspedas, aŭ en la franca, kiu ja estas la oficiala lingvo de la Poŝta Unio. Tamen - ĉu por Japana poŝtisto *Pays Bas* estas rekonebla, se li la francan ne konas, mi ege dubas.

E 599

E 558

Konklude: pri la proponoj de *Waringhien* koncerne la landnomojn mi ne estas entuziasma, ĉar: 1. ĝenerale la proponitaj ne estas gente neŭtralaj, kaj 2. ofte ili estas eĉ pli longaj ol la ĝisnunaj, ekz. *Anglatero, Britanio, Danemarko*.

La dua eseoj temas pri „La Esperanta Pasivo” kaj certe ĝi kaŭzos la E 589.2 : E 589.6 : plej bruajn disputojn. Nu, mi konsentas kun *Waringhien* k.s. ke la : E 587[21 : 22] . pasiva kaj la aktiva formoj ne estas simple simetriaj, pro la nura fakto : E 588 ke en la pasivo mankas la nekunmetitaj verboformoj. Kvankam la esprimoj „mi legis libron” kaj „mi estis leganta libron” ne estas tute samsignifaj, la pasiva formo „la libro estis legata de mi” devas respondi al ambaŭ signifoj de la du aktivaj frazoj. Mi ne volas nei ke la de li porpledata uzo de la pasivaj participoj estas Zamenhofa. Tie tamen ĉesas miaj koncedoj. Ĉu ĉi tie temas pri ĝermana, aŭ eĉ nederlanda herezo, mi ne scias. Fakto estas ke en la ĝermanaj lingvoj la uzo de la diversaj tempoj ne respondas al tiu de la „herezuloj” en Esperanto, kaj ke ili inter si diferencas. La skandinaviaj lingvoj eĉ formas la pasivon per aldono de s sufikse al la aktiva formo. Mi konstatas ke en la praktiko ofte estas neeble decidi ĉu iu verbo apartenas al la klaso de tiuj kun rezulto kun daŭro, aŭ al tiaj sen daŭro. Kie estas la limo? Ĉio ĉi tio estas arbitro. Cetere, se mi diras ekzemple, ke hieraŭ oni prezentis

teatraĵon, oni povas prave supozi ke oni ankaŭ finprezentis ĝin, ĉar, se ne, mi kredeble dirus, ke oni prezentis la unuan aŭ la tioman parton de la teatraĵo. Kaj se mi aŭdas, ke hieraŭ vespere iu teatraĵo estis prezentata, mi subkomprenas, ke ĝi estis ankaŭ finprezentata, se mi ne havas apartan kaŭzon por kompreni alie. Se mi parolas pri ago praktike momenta, ĝia okazo implicas ĝian finiĝon. Se mi do diras: „La 22an de aprilo 1944, matene je la 7a horo 13 minutoj li estis mortpafata” tio nepre signifas ke en precize tiu momento komenciĝis lia mortpafiteco. Kial diri ke en tiu momento li estis mortpafita, se tiu lingvuzo devigas min diri ke je la 7a kaj kvarono en tiu tago li estis *jam* mortpafita, kio cetere estus dusenca (ĝi povus signifi, ke li jam tiam estis mortpafata!) kaj devigus min diri ke je tiu horo „li estis *antaŭe* (aŭ *jam pli frue*) mortpafita”. Kelkfoje, se mi volas insisti pri la tempo de la okazaĵo, mi devas efektive tiel min esprimi, ekz. „Kiam mi vizitis lin la pasintan semajnon, li ne tre bone fartis; li estis falinta de la ŝtuparo la antaŭan tagon.” Intence en ĉi tiu ekzemplo mi uzis aktivan partupon; kun pasiva partupon estus tute simile: „li estis trafita de apopleksio la antaŭan tagon”. Se mi ne aldonas tiun tempoindikon, ĉi tiuj frazoj uzataj de la herezuloj signifas, ke la falo, resp. la apopleksio okazis pli frue, en ne indikita momento, - laŭ la ortodoksuloj, se mi bone komprenas W., la *falo* okazis *antaŭ* mia ĉeesto, sed la *apopleksio dum* mia ĉeesto! Se la herezuloj volas diri ĉi tion, ili diras: „...li estis trafata de apopleksio”, kvankam ili ne diras: „...li estis falanta de la ŝtuparo”, sed, same kiel la ortodoksuloj, „...li falis de la ŝtuparo”. La frazo: „Kiam mi vizitis lin, li estis falanta de la ŝtuparo”, signifas ke la falo okazis ĝuste en la momento de mia alveno ĉe li. Nu, ni konsentas ke pri plena paraleleco ne povas temi. Oni devas iel solvi la dilemon. Sed la konsekvencoj de la Varengjena solvo estas por multaj nepre ne akcepteblaj.

Se pri agoj momentaj, sen daŭro, mi volas indiki ripetiĝon, mi simple uzas *-ad*. Tion mi ja ankaŭ faras uzante aktivan formon.

Ni nun esploru iom la verbojn kiuj esprimas agon pli-malpli daŭran. Se mi diras ke mi legas libron, tio nenion implicas pri la momentoj de mia eklego kaj de mia finlego. *Eklegi* kaj *finlegi* esprimas momentajn agojn. Se mi diras ke hodiaŭ la libro estis finlegata, tio implicas ke hodiaŭ ĝi atingis la staton de finlegiteco. Ni havas la prefikse uzeblan radikon „*fin*” kaj la same prefikse uzeblan prepozicion „*el*”, per kiuj ni povas esprimi la finiĝon; kial do fari tion per la participa sufikso? Ni havas eĉ ankoraŭ unu alian rimedon. En rilato al „kunmetitaj tempoj” ni kutime diras ke „*esti*” estas helpverbo, sed ni samrajte povas diri, ke ĝi estas kopulo, ke principe estas nenio (gramatika) diferenco inter „*miaj manoj estas puraj*” kaj „*miaj manoj estas lavitaj*”. Kvankam kun la participoj ni ordinare uzas „*esti*”, ni povas plenrajte uzi ankaŭ aliajn

verbojn, ekz. „*iĝi*”, kaj se mi vere volas esprimi ke io ne nur „*estis -ata*”, sed ankaŭ „*iĝis -ita*”, nenio malhelpas min uzi tian formon, kiel mi efektive kelkfoje faris. Sed, verkante recenzon pri teatraĵo kiu hieraŭ vespere *estis prezentata*, mi ne uzus *iĝi*, nek *fin-* aŭ *el-*, nek mi dirus kun Waringhien „...*estis prezentita*” (p. 202/6), tute simple ĉar mi sentas nenian bezonon pri tio insisti, ĉar ĝenerale tio estas memkomprenebla se mi ne kategore asertas la malon. Mi volas rakonti ke ĝi okazis kaj *kiel* ĝi okazis; pri la memkompreneblaĵo ke ĝi ankaŭ atingis sian finon vere ne necesas insisti. Eble el ĉi tiu psikologia, sed lingvo-influata diferenco fontas la lukto inter la du skoloj¹⁾.

¹⁾ En artikolo de d-ro K. Kalocsay en *Heroldo*, n-ro 1312 (16-XI-1960), ĉi tiu argumentas ke la aspekta sistemo per „*estis (estas) -ita*” „*esprimas la plenumiĝon (kun unumomenta eraro)*”, dum la hereza sistemo (per „*-ata*”) tute ne esprimas ĝin. Tio evidente *ne* estas vera. Per „*-ita*” oni esprimas *ne* plenumiĝon, sed *nur plenumitecon*. La *plenumiĝon* la aspektuloj *subkomprenas*, sed *ne esprimas*. Se mi diras: „Kiam post longa foresto mi revenis al la urbo de miaj infanaj jaroj, ĝi estis tiel ŝanĝita, ke mi apenaŭ rekonis ĝin”. La propozicio „*ĝi estis tiel ŝanĝita*” rilatas al la momento de mia reveno. *Kiam* la ŝanĝoj okazis, pri tio mi nenion scias, aŭ almenaŭ mi nenion diris. Cetere urbo daŭre ŝanĝiĝas, t.e. daŭre estas ŝanĝata, kaj do - laŭ la aspektula koncepto - pri *plenumiteco* tute ne povas temi, kio implicus ke entute oni ne povas diri ke la urbo estas *ŝanĝita*! Ĉi tiun konsekvencon la aspektuloj kredeble ne estas pretaj tiri el sia starpunkto.

D-ro Kalocsay krome asertas ke la herezuloj per „*-ata*” tute ne esprimas la plenumiĝon. Tio estas nur parta vero. Ni esprimas la *okazon* de la ago, kio en la kazo de momentaj agoj *implicas* la plenumiĝon. Oni povas diri ke „*atingata*” fakte ne karakterizas staton, ĉar „*atingoteco*” senpere transiĝas al „*atingiteco*”. Tio do havas tiun avantaĝon, ke per „*atingata*” ni povas esprimi *okazon* + *plenumiĝon*, dum per „*atingita*” ni esprimas la *plenumitecon*. Kompreneble tio ne validas por verboj indikantaj agojn daŭrohavajn. Iliaj *at*-participoj esprimas nur la *okazon*, sed ne la plenumiĝon de la ago. Tamen, ofte la tempoindiko rajtigas nin subkompreni tiun plenumiĝon. Ni scias ke ĝenerale oni prezentas teatraĵon komplete en unu vespero. Aŭdante do, ke hieraŭ vespere teatraĵo *estis prezentata*, mi kredas min prava, subkomprenante ke oni prezentis ĝin ĝisfine, se oni ne informas eksplicite pri la malo. Sed aŭdante, ke ekestis brulo en la teatro, kiam tie *estis prezentata* „Hamleto” hieraŭ vespere mi ne opinius ke mi prave subkomprenus la ĝisfinan prezentadon; kontraŭe, mi inklinus supozi antaŭfinan ĉesigon.

Se ni volas *esprimi* la plenumiĝon (aŭ la komenciĝon), ni devas diri aŭ „*iĝi -ita*” aŭ „*ekesti -ita*”, aŭ „*esti fin -ata*”, aŭ „*esti el -ata*” (resp. „*iĝi -ata*”, aŭ „*ekesti -ata*”, aŭ „*esti ek -ata*”), t.e.: ni devas aŭ per la *kopulo* esprimi la transiron de unu stato en alian (*iĝi* aŭ *ekesti* + la participo esprimanta la novan staton), aŭ per *afikso* ni devas krei verbon de ago sen daŭro, por ke „*esti -ata*” esprimu la plenumiĝon, resp. la komenciĝon de la ago daŭrohava.

Interese estas ke fakte laŭ la Varengjena rezonado, laŭ kiu ĉe la pasivaj participoj ne temas pri antaŭtempeco, samtempeco kaj posttempeco, sed pri „aspektoj” de la verbo, ĉe kiuj temas nur pri *-it-* kaj *-at-*, ne estas loko por *-ot-*! Nu, *-ot-* tamen troviĝas en lia libro, sed *ne* en la eseo pri la pasivo en Esperanto, sed en iuj „lingvaj respondoj” (p. 230). La ekzemploj estas Zamenhofaj, sed bedaŭrinde ne estas ekzemplo pri *-ot-* en kunmetita tempo.

Unu afero povas esti klara por ĉiu: la argumentoj de ambaŭ partioj en ĉi tiu disputo estas nun sufiĉe konataj; plua diskuto hodiaŭ ne havas sencon, ĉar por povi diskuti oni devas akordi, kaj tiu baza akordo evidente mankas. La evoluo de la lingvuzo decidu. Tamen estus bone, se ĉiu kiu verkas ion aŭ skribas leteron, signus sian skribaĵon per iu konvencia signo (ekz. o = ortodokse; h = hereze) por montri kiun sistemon li aplikas. Tio indikus kiel ampleksa estas ĉiu el ambaŭ partioj, kaj kiel korekte aŭ nekorekte la anoj de ambaŭ sistemoj aplikas sian sistemon. Por fini pri ĉi tiu ĉapitro mi atentigu la legantojn pri la diskuto pri la sama temo sur la paĝoj de *Heroldo de Esperanto* (n-roj 1287, 1293, 1294, 1295, 1298, 1300, 1301, 1302, ... (?))

Sekvas eseo pri „*Tri Enketoj*”: I. *Pri la Modo post MALHELPI ktp.*, II. *La Modo post KVAZAŬ*, III. *Pri la Sufikso -END*. En la unua el ĉi tiuj tri temas pri tio, ĉu la u-modo estas taŭga - ĝenerale aŭ en iuj kazoj - post esprimoj kiel: *io malhelpis ke, (ne) estas eble ke, oni malebligis ke, nenio malebligas ke, ... kondiĉe ke, ktp.* Montriĝis ke la plimulto de la pridemanditaj eminentuloj uzas jen u-modon, jen indikativon, jen kondiĉan modon, laŭ la kazo. Ankaŭ mia lingvuzo montriĝis konforma al tio. Per la lasta el la tri enketoj (traserĉado de pluraj verkoj) W. montras ke la uzofteco de *end* estas tiel malgranda, ke fakte ĉi tiu sufikso estas superflua.

Tre interesa kaj studenda estas la dua el ĉi tiuj tri. Mi volas rimarkigi nur ke ne tute ĝusta estas la aserto (meze sur p. 214) ke en la kazoj kie Z. uzas ĉiam indikativon post *kvazaŭ* pro tio ke la fiktivecon jam montras kaj la vorto *kvazaŭ*, kaj la ĉefverbo, la vorton *kvazaŭ* povas eĉ anstataŭi la subjunkcio *ke* (sekvata de indikativo) sen ia sentebla diferencigo en la fiktiveco. Tio ofte validas, sed ne ĉiam, ekzemple ne por la citita frazo: „*Li sentas, kvazaŭ li falegas en senfinan malplendon.*” Anstataŭigo de *kvazaŭ* per *ke* tute forigas la fiktivecon. Rimarkinde estas, ke W. karakterizas ĉi tiun uzon de *kvazaŭ* kiel „*rusisman*”, kaj asertas ke neniu ĝin imitis, ke ĝi arhaikiĝis. Al mi la multaj donitaj ekzemploj de tia uzo de *kvazaŭ* neniel impresas rusismaj aŭ arhaikiĝintaj. En la kazoj Cb, kie la subjunkcio *kvazaŭ* enkondukas objektan propozicion, la lingvoj germana, angla kaj nederlanda uzas ofte *dass, that, dat* (= *ke*), sed en la kazoj Ca, kie la subjunkcio *kvazaŭ* enkondukas subjektan propozicion, la nomitaj lingvoj ĝenerale uzas *als ob, as if, alsof*, kaj mi ne dubas ke almenaŭ en tiaj kazoj la uzo de *kvazaŭ* neniel arhaikiĝis. Kaj kvankam sendube en multaj kazoj de la

tipo Cb oni povas uzi *ke* anstataŭ *kvazaŭ*, certe restas iuj kazoj kie tio ne povas ²⁾.

Ne ĝusta ŝajnas al mi la argumentado de W. sur p. 216/217. Se mi vidas iun zigzagiranta mi ĝenerale ne *povas* scii ĉu li estas ebria aŭ ne. Se mi diras: „*li iras kvazaŭ li estus ebria*”, per la us-modo mi esprimas, ke mi estas konvinkita pri lia neebrieco. Sed kiel mi diru, se mi volas esprimi pri tio nenian opinion? Mi povas eviti la embarason, dirante: „*li iras kiel ebriulo*”, aŭ „*li iras kiel (li irus/iras) estante ebria*”. Persone mi kredeble tute trankvile dirus en tia kazo (kun s-ro Bailey): „*li iras kvazaŭ li estas ebria*”. Por multaj nederlandanoj, por angloj kaj por germanoj „*alsof*”, „*as if*” kaj „*als ob*” ne implicas nepre fiktivecon, same kiel la ŝajno povas esti konforma aŭ nekonforma al la realo. Se Bailey do distingas inter „*li iras kvazaŭ li estus ebria*” kaj „*li iras kvazaŭ li estas ebria*” li faras precize tion, kion li faras en la angla: „*he walks as if he were drunk*” kaj „*he walks as if he is drunk*”. La demando en ĉi tiu disputo do estas: ĉu *kvazaŭ* esprimas nepre fiktivecon, aŭ nur ŝajnon (kiu eble konformas al la realo)? Tiuj kiuj tenas la duan starpunkton do devas esprimi nepran fiktivecon per us-modo.

La esprimoj „*farinte, kvazaŭ ŝi sin mortigas*” (p. 215, meze) kaj „*la suna kampo elrigardis, kvazaŭ ĝi antaŭ minuto estis ankoraŭ blinda kaj nun ricevis okulojn, per kiuj ĝi rigardis supren al la brilanta ĉielo*” (p. 216/10) apartenas ne al la kategorio Db, sed al Cb. Cetere *Waringhien* mem montras ke ofte estas malfacile distingi inter adverba kaj subjunkcia uzoj de *kvazaŭ*.

Sekvas „*Kelkaj Gramatikaj Konsultoj*”. En tiu eseo estas tuŝataj ankaŭ kelkaj interesaj punktoj, ekzemple la uzo de „*lasi*”. Ĉe tio plej enigma, miaopinie, estas la uzo de la refleksivo en kelkaj kazoj, kaj la sama problemo ekzistas ĉe „*igi*”. Ekz. „*la ... reĝo lasis poluri sian oran kronon*”, „*la geedzoj lasis (= igis) pretigi por si sian tomban ŝtonon*”, „*ili ne volis lasi sin nobeligi*”, „*la fiŝoj lasadis sin karesadi*”, „*ŝi ... lasis sin peli de la ondoj*” (Z. ne skribis: „*ŝi lasis la ondojn peli ŝin*”, kion mi ja farus).

Jam de longe mi konscias pri la problemo. Kvankam sen ia dubo mi dirus: „*Li igis la kuraciston veni al li*”, mi same sendube dirus: „*Li venigis al si la kuraciston*”. Nu, tio respondas al la rimarko de W. pri niaj anglaj samideanoj, kiuj kondamnas la frazon: „*Li lasis sin puni por ŝi*”, sed akceptas: „*li punigis sin por ŝi*”. Tamen estas diferenco: en la Varengjena ekzemplo temas pri „*sin*” (objekto), en mia pri „*al si*” (adjekto). Tio do ankaŭ signifas ke mia ekzemplo ne povas ilustrian „*pasivsencecon*” de la infinitivo (*veni*), kaj do kredeble interalie tial (a) oni sentas, ke oni ne povas diri „*li igis veni al si la kuraciston*”, kaj (b) W. ne prave imputas al la angloj ke ili akceptas „*pasivsencecon*”

²⁾ Mi ĵus trovis ĉe Privat (*Junaĝa Verkaro*, p. 46) jenan frazon: „*la ĝoja knabino ne ŝajnas kvazaŭ ŝi dronigis iun*”!

E 583.47

E 587.23

E 26 end

E 583.46

E 593.241

E 582.8 :

: E 589.2 :

: E 589.4 :

: E 578.7/.8

de pun en „*li punigis sin por ŝi*”. En tiu okazo la analizo devas esti jena: „*punigi*” estas unu bloka verbo, kiu, kiel verboj kiel *trinkigi*, *manĝigi*, *kredigi*, k.s. povas havi diversajn objektojn: *li trinkigis sian ĉevalon*, *li trinkigis akvon al sia ĉevalo*; *li manĝigis ŝin de sia pano* (t.e. de la pano de tiu „*li*”); *li manĝigis al ŝi sian panon*; *li manĝigis sian panon de ŝi* (kun la sama signifo); sed: *li igis ŝin manĝi lian panon aŭ de lia pano*, kontraste al: *li igis ŝin manĝi sian panon aŭ de sia pano*. Ankaŭ: *li kredigis sin* (t.e. *li igis sin kredi aŭ: kredanta*) *ke li estas gravulo*; *li kredigis sin gravulo* (= *li igis kredi sin gravulo* = *li kredigis ke li estas gravulo*). Tio klarigas la uzon de refleksivo kun tiaj verboj (en frazo kiel: *li punigis sin por ŝi*) kaj la akcepton de tiu uzo, kaj restas la problemeco de la pasivsenceco de infinitivoj en la cititaj frazoj kun *lasi* aŭ *igi*. W. opinias ke, se la subjekto de la infinitivo (= la objekto de *lasi* aŭ *igi*) estas identa kun la subjekto de *lasi* aŭ *igi*, la infinitivo per tio ricevas sencon pasivan. Tiun opinion refutas la jenaj ekzemploj: „*li igas (aŭ lasas) sin kredi tion*” kaj „*mismemorante la faritan interkonsenton, li igis sin vane atendi je ŝi*” (kun aktivsenca *atendi*, kiun frazon oni komparu kun la forme tre simila, sed tute alisenca: „*mismemorante la faritan interkonsenton, li igis sin vane atendi de ŝi*” kun pasivsenca *atendi*), kiel ankaŭ aliaj ekzemploj, kiel mi tuj montros. Ĉiuj donitaj ekzemploj donas la impreson ke, kiam la objekto de *lasi* aŭ *igi* (kiu estas la subjekto de la postvenanta aktivsenca infinitivo) ne estas menciita aŭ prenas la formon de adjekto (*de ...*) ĉe la pasivsenca infinitivo (ekz.: *ŝi lasis sin peli de la ondoj* = *ŝi lasis la ondojn peli ŝin*; *li igis sin atendi de ŝi* = *li igis ŝin atendi lin*), refleksivoj rilatas al la subjekto de *lasi* aŭ *igi*, t.e. ke tiam *lasi -i* aŭ *igi -i* estas kvazaŭ bloka verbaĵo. Pasivsenceco, kiel ŝajnas al mi, ludas nenian rolon ĉi tie. La donitajn ekzemplojn *ili lasis (= igis) pretigi por si sian tomban ŝtonon* oni ja ne povas analizi jene: „*ili lasis sian tomban ŝtonon esti pretigata por si*”, ĉar tiu ĉi „*si*” devus esti „*ili*”! Inter la donitaj ekzemploj ne troviĝas tiaj, en kiuj la infinitivo estas netransitiva, sed estas ja facile konstrui tiajn ekzemplojn: „*ŝi lasis ludi per si*”, „*li igis paroli pri si*”. Evidente ke ĉi tie ne povas temi pri pasivsenceco de la verboj *ludi*, *paroli*. Cetere, en tiuj ĉi ekzemploj, kiel ankaŭ en „*la reĝo lasis poluri sian kronon*” kaj „*li igis manĝi sian panon de ŝi*”, la subjektoj de *lasi* aŭ *igi* kaj de la infinitivo ne estas identaj. Tial la sola ebla analizo estas: „*lasis pretigi*”, „*lasis ludi*”, „*igis paroli*”, „*lasis poluri*”, „*igis manĝi*”, rolas kiel blokoj. Tiu interpreto ankaŭ klarigus la esprimon kiun citas G r e g o r (Sc. R. 9 104, 106; La Fontoj de Esperanto, p. 13, 15, piednoto 81): „*ili ordonis porti sin*”, kie „*ordonis porti*” rolas kiel bloka verbaĵo.

Kvankam ĉi tiu lingvuzo verŝajne fontas el la germana kaj franca lingvoj, ĝi tamen ne estas identa kun la germana, kaj la ĉi-supra klarigo ne estas aplikebla al la germana.

La motivo por ĉi tiu malgranda studo estis demando farita al W., ĉu estas ĝuste diri: *Lasu vin kisi!*, aŭ ĉu oni devas diri, kun Pastro D o w n e s: *Lasu vin esti kisata!*? En sia recenzo en The British Esperantist (No. 658; junio 1960; p. 272) Pastro D o w n e s ankoraŭ esprimas la opinion, ke efektive la esprimo „*Lasu vin kisi!*” estas idiotismo, kiun ni ne akceptu en Esperanto. Mi ne tiel opinias. Se mi diras: „*Lasu ŝin kisi!*”, tiu frazo povas havi du signifojn, t.e.: *ŝin* povas esti la objekto de *lasu* kaj la subjekto de *kisi*, kies objekto ne estas menciata, aŭ - kaj tion britoj trovas stranga - ĝi povas esti la objekto de *kisi*, dum ties subjekto (= la objekto de *lasu*) ne estas menciata. Se la subjekto de *lasi* aŭ *igi* estas identa kun la sola objekto menciata, tiu objekto ordinaro, kvankam ne ĉiam, estas la objekto ne de *lasi* aŭ *igi*, sed de la sekvanta infinitivo. Do, *lasu vin kisi* = *lasu kisi vin*, kaj ŝajne tute ne temas pri pasivsenceco de *kisi*. [Tamen, iun pasivsencecon sugestas la adjektoj kun *de*, indikantaj la subjekton de la aktivsenca infinitivo: *lasu vin kisi de mi* (komp.: *lasu vin esti kisata de mi*). Mi rimarkigas ke tiaj adjektoj eblas nur en konstruoj kun *igi* kaj *lasi*, sed ne kun la verboj ankoraŭ menciataj.]

Ŝajnas al mi ke ĝis tie temas pri nenia idiotismo. Idiotismo troviĝas nur en la uzo de la refleksivo, pro tio ke la uzo aŭ neuzo de refleksivo en tiaj kazoj dependas de la nemencio aŭ mencio, respektive, de la objekto de *lasi*, *igi*, ktp., kiu samtempe estus aŭ estas la subjekto de la sekvanta infinitivo.

Simile idiotisma uzo de refleksivo ekzistas en pluraj naciaj lingvoj post la ekvivalentoj de *lasi* kaj *igi*, sed ne post aliaj verboj, kiel ekz. *peti*, *inviti*, *instigi*, *ordoni*, (*mal*)*permesi*, *postuli*, kiuj postulas la uzon de „prepozicio” antaŭ la sekvanta infinitivo (G. *zu*; A. *to*; F. *de*; Ned. *te*).

Ni komparu Esperanton kun la germana lingvo:

Li lasis (igis) sin mortigi = *Er liess sich töten.*
= *Li lasis (igis) mortigi sin.* = *(sich = „sin”)*

Kaj laŭ la ekzemplo de Lidja Z a m e n h o f (vidu supre) ankaŭ:

Li	{	<i>petis</i>	} <i>sin</i>	} <i>mortigi.</i>	} <i>bat</i>	} <i>lud ein</i>	} <i>forderte auf</i>	} <i>ihn (= „lin”)</i>
		<i>invitis</i>						
		<i>instigis</i>						
		<i>ordonis</i> [al]						
		<i>permesis</i> [al]						
} <i>aŭ</i>	} <i>mortigi</i>	} <i>Er</i>	} <i>befahl</i>	} <i>zu</i>				
					<i>malpermesis</i> [al]	} <i>gestattete</i>	} <i>töten</i>	
					<i>postulis</i> [de]			} <i>verbot</i>
} <i>sin.</i>	} <i>sin.</i>	} <i>forderte</i>						

Ŝajnas ke anglojn ŝokas ĉiuj ĉi tiuj idiotismaj uzoj, eble malpli pro la refleksivo (kiun la angla lingvo ne havas), ol pro la aktiva formo „*mortigi*” (ĉar la angloj uzas pasivan formon en tiaj kazoj). Min - sendube sub influo de mia nacia lingvo - ne ŝokas la ekzemploj kun *lasi* kaj

igi, sed jes tiuj kun la aliaj verboj - sendube ankaŭ sub influo de mia nacia lingvo, kiu, kiel la germana, en tiaj kazoj ne uzas refleksivan pronomon. Mi rimarkigu ankoraŭ ke la donitaj germanlingvaj ekzemploj estas plursencaj:

Er bat ihn, zu töten = Li petis lin, mortigi, dum

Er bat, ihn zu töten = Li petis, mortigi $\left\{ \begin{array}{l} \text{lin (= iun trian personon).} \\ \text{sin (= la petanton).} \end{array} \right.$

Se en la germana lingvo oni uzas refleksivon, oni havas:

Er gestattete sich, zu töten = Li permesis sin, mortigi, dum

Er gestattete, sich zu töten = Li permesis [onin], mortigi sin.

Kazoj de la tipo „*ili ordonis porti sin*” certe estas maloftaj. Mi petas ĉiujn esperantistojn noti tiajn kazojn kaj informi min pri ili. Mi ankaŭ ŝatus scii por kiuj la uzo de la refleksivo en ĉi tiaj kazoj ne estas ŝoka. Mi ankoraŭ notu ke en „*S o f o k l o: Reĝo Edipo kaj Antigona*” (traduko de la brito D. B. Gregor) mi rimarkis du kazojn de la por britoj (sed ne por multaj aliaj) ŝoka lingvuzo: „*ne sin lasi venki de virino*” (p. 177/6) kaj „*S o f o k l o lasas kompreni sian sintenon al Kreono*”.

En la lumo de tio, kion W. diras en sia eseo pri „*La originala strukturo de Esperanto*” (p. 102-129), nome en ĝia parto II, titolita „*La frazo*”, ĉi tiu idiotisma uzo de la refleksivo, t.e. rigardi en certaj cirkonstancoj la kombinojn de verbo plus infinitivo kiel unu blokon, aperas eĉ pli stranga.

E 111 En la eseo „*Pri la Nomoj de la Esperantaj Literoj*” W. proponas, por
E 114 plifaciligi la distingon, uzi por la konsonantoj jenajn nomojn:

lo, ŭo, fo, so, co, jo, ŝo, ĉo, ko, po, to, ho, mo,
ra, va, za, ĵa, ĝa, ga, ba, da, ha, na;

(krome: *q = kuo, w = vavo, x = ikso, kaj y = ipsilono, kaj alfa, beta, gama, delta, epsila, dzeta, eta, teta, jota, kapa, lambda, muo, nuo, ksio, omikra, pio, ro, sigma, taŭo, upsila, fio, hio, psio, omega*). La argumento estas, ke la uzo de la adjektiva *a* (por substantiva funkcio) neniel „ŝokus, eĉ plej delikate, la Fundamenton”. Pri tio oni povus disputi. Pli grava ŝajnas la demando: ĉu sufiĉas ĉi tiu distingo? Laŭ en Novzelando farita eksperimento la klasikaj nomoj kaŭzis trioble tiom da eraroj kiom la Varengjenaj. Tamen, la fonetika eksperimento de Radio Roma (v. Sc. R. 4 135) montras ke tiel simpla solvo neniel sufiĉas. Tiu eksperimento sugestis ekz. ke *s* kaj *z* ne ofte intermiksiĝas, sed *s, c, kaj f* tre ofte, *v* kaj *f* malofte, sed *v* kaj *b* ofte, *t* kun *d, p* kun *b, kaj k* kun *g* malofte, sed *t, p, kaj k* ofte, ktp. Koncerne literuman alfabeton mi rimarkigu, ke principe la listo en la UEA-jarlibro ŝajnas pli taŭga, ĉar ĝi konsistas el komunuzaj substantivoj. Eble pli taŭga elekto estus ebla, sed principe oni elektu inter la *oftaj* substantivoj aŭ oni uzu ĝenerale konatajn geografiajn nomojn (ekz. *q = Quebec, w = Washington*).

Sekvas eseo „*Neologismoj*” kun jenaj partoj: *I. Kial Riĉiĝas la Vortaroj, II. Majstroadmira aŭ idolkulto? III. Respondo al la Apelacio de la Aŭstria Esperanto-instituto*. En la unua parto trafis min ekzemple jenaj: „*La oficiala Esperanto povas sufiĉi por tiuj, kiuj parolas ĝin unu fojon en la jaro kaj skribas per ĝi unu leteron ĉiun sesan monaton. Sed kiam oni provas vivi tiun lingvon (kiel okazas interalie en la hejmoj, kie la geedzoj povas interkompreniĝi nur per Esperanto), kaj kiam oni ekrimarkas, ekzemple, ke ni ne posedas registritan kaj tradician rimendon por esprimi la agon ekkapti ion falintan kaj levi ĝin de la planko, tiam vere oni sentas, kiom ankoraŭ mankas al nia lingvo, por ke ĝi estu kompleta!*” (p. 246). Per tio W. volas klarigi kial apud *vagonaro, komercaĵo, naĝbarelo, rulbloko, falsirmilo, kaj krutmalsupreniro* aperis *trajno, varo, buo, pulio, paraŝuto, kaj plonĝo*. Nu, kredeble la opinioj pri bezonateco de novvorto estas ekstreme subjektivaj aŭ dependas de la nacia lingvo de la subjekto. Verdire *necesaj* la pli multaj ĉi-supraj anstataŭaĵoj ne estas. Cetere: kio estas necesa? La pli multaj homoj sur nia tero kredeble supozas ke verbo *stari* estas necesa, sed la franca funkcias pli-malpli bone sen verbo kun tiu signifo! Kelkfoje iu lingvo havas tre oportunan manieron por esprimi ion, kion aliaj lingvoj devas iom malgracie ĉirkaŭskribi. Ekzemple en la nederlanda lingvo oni kutimas diri: „*iets valt mee (resp. tegen)*”, kio signifas, ke „io montriĝas pli bona aŭ malpli malbona (resp. malpli bona, aŭ pli malbona) ol ekpektite”, kaj ni eĉ derivas tre oportunajn substantivojn: „*meevaller*” kaj „*tegenvaller*” por „io kio montriĝas pli, resp. malpli bona ol ekpektite”. Nu, multaj naciaj lingvoj - kiel ankaŭ Esperanto - devas vivi sen tia oportunaĵo. Kompare kun tio *paraŝuto* anstataŭ *falsirmilo* estas simple ridindaĵo. Aliparte, se W. esprimas dubon pri *persvadi* kaj *ekspekti* apud *konvinki* kaj *atendi*, mi estas inklinata opinii ilin pli havindaj ol *trajno, varo, buo* kaj *paraŝuto*. Kaj aliparte la dusencan uzon de *krom*, kiun W. trovas evidente akceptinda (p. 260), mi trovas nepre rifuzinda, kaj tion ne pro nacilingva influo, ĉar ankaŭ mia nacia lingvo uzas nur unu vorton por la du malaj sencoj de *krom* - sed evidente pro la unusenca *krome*. Pri gustoj, koloroj kaj ... bezonateco de novvortoj oni ne povas fruktodone disputi. Fakto estas tamen ke W. sprite montras kiel *Z a m e n h o f* mem estis unu el la plej fekundaj fabrikistoj de novvortoj.

„*Editoraj demandoj*” estas la sekva eseo, kaj tuj W. konstatas ke „ankoraŭ unu neologismon!” Nu, kiel nederlandano mi kredeble ne sentus bezonon por ĉi tiu novvorto kaj uzus „redaktoro” aŭ „redaktanto”. Inter „redaktoro” de gazeto kaj „editoro” de libro (verko(j) de alia(j) persono(j)) ne distingas ekz. la nederlanda („*redakteur*”), la angla „*editor*”, dum la germana distingas inter „*Schriftleiter*” kaj „*Herausgeber*”. Mi ĵus konstatis, ke Prof. *L a p e n n a* diris ke Wil-

liam Auld redaktis la Esperantan Antologion. - Nu, en ĉi tiu eseo la aŭtoro faras tre pravajn rimarkojn kaj kritike esploras la laboron de pluraj Esperantaj „editoroj” de verkoj de Zamenhof.

E 098 La tria parto de la libro, kun la titolo „*Niaj Perspektivoj*”, havas mem tri partojn. La unua titoliĝas: „*La Naciaj Lingvoj kaj La Internacia*”, kun eseo pri „*Lingvaj Obstakloj al la Internacia Kompreniĝado*” (I. *Strukturaj Problemoj*, II. *Sencaj Problemoj*, III. *Sociaj Problemoj*) kaj „*Du Alvokoj al la Instruistoj*” (1928; 1946). — La dua titoliĝas „*Esperanto kaj Ĝiaj Konkurantoj*” kun tri eseoj pri „*La Vojo Nia*”, „*Esperanto antaŭ la Tribunalo*” (eseo kiu koncernas la doktoran disertaĵon nederlandlingvan de d-ro Manders: *Vijf kunsttalen* (= Kvin artlingvoj: *Volapük, Esperanto, Ido, Occidental, Novial*), kaj „*Enket-suplemento pri Interlingua*”. — La tria titoliĝas „*La Instruoj de la Pasinteco*” kun nur unu eseo: „*Historia skizo de la Esperanta Movado*”.

E 019 Ĉi tiu tria parto de la libro estas ankaŭ tre instrua kaj interesa, kaj ankaŭ provizas nin per bonaj argumentoj en nia lukto por la I. L. Interesa estas i.a. la citita aserto de Cart, ke lingvo estas antaŭ ĉio socia konvencio. „Oni grave eraras, kiam oni penas solvi la demandon per simpla komparo inter diversaj lingvaj sistemoj: la moralaj, la ekonomiaj, la opiniaj kondiĉoj, kiujn pure lingvistoj aŭ filozofoj tro volonte juĝas flankaj elementoj de la serĉata solvo, estas, mi ne diras tiel gravaj, sed pli gravaj, ol la nur lingvaj ... La perfekteco tie ĉi konsistas malpli en la lingvo mem, ol en la plena akordo de tiuj, kiuj ĝin uzas.”

E 09 Pri la fabrikistoj de ĉiam novaj projektoj kaj tiuj kiuj forlasas jaman sistemon favore al iu nove kreita, Waringhien rimarkigas, ke tiuj personoj faras unu fundamentan eraron: ili opinias ke „merkato” por internacia lingvo, ke „demando por ĝi”, ekzistas, kaj ke la malrapida progreso de Esperanto, ekzemple, estas atribuenta al tio, ke ĝiaj (lingvistikaj) kvalitoj ne estas kontentigaj. Ili do serĉas „lingvon” kun tiaj kvalitoj, ke tuj ĝi konkeros la merkaton, ke tuj ĝin akceptos tiuj kiuj havas internaciajn interrilatojn. Ili faras siajn „lingvojn” pli kaj pli naturalismaj, pli kaj pli latino-grekaj, ... kaj tamen ne kaptas la homojn. La *Division of General Education* (Fako de Ĝenerala Edukado) de la Nov-Jorka Universitato en 1959 decidis ĉesigi la kurson pri *Interlingua* pro manko de interesiĝo!

Fontoj de interesperantista polemiko aŭ disputo en ĉi tiu tria parto de la libro ne troviĝas, miaopinie.

La tri efektivajn, ĉefajn partojn mi nun pritraktis laŭenhave. Enkondukas la libron „*Preludo*”, en kiu la aŭtoro vangofrapas tiun grandan plimulton de siaj kolegoj-lingvoscienculoj, kiu ignoras la fenomenon „Internacia Lingvo”, kio estas perfido, ne al ni, Esperantistoj, kaj nia strebado, sed al ilia propra scienco. Per senkompata ironio W. ridin-

digas profesoron Sauvageot, elektitan de Unesko por prezidi la komitaton de la lingvaj ekspertoj kunvokitaj esplori la demandon pri internacia artlingvo, en 1947, pri kies kvalifikiteco por ĉi tiu tasko vi jam ne dubos post lego de ĉi tiuj Varengjenaj paĝoj!

Inter la diversaj ĉefpartoj troviĝas poe unu *Interludo*; la unua temas pri etimologio de pluraj antaŭnomoj, la dua pri tiu de ŝakterminoj. La libro finas *Postludo*, en kiu la aŭtoro klarigas fremdlingvajn citaĵojn (latinajn, francajn, italaajn, kaj grekan), por fini per latinaĵo kiun li - malice! - ne klarigas. 415 : 413.13 E 2 : E 557.1 415 : 794.1 E 2 : 794.1

En dankparolo la aŭtoro aparte laŭdas la eldoniston - nian ne troŝateblan samideanon J. Régulo Pérez - pro tio ke li eĉ fandigis specialajn tipojn por ĝuste reprodukti la supersignitajn literojn de la Praesperantoj. Tutkore mi kunlaŭdas. Finas la libron indeksoj de propraj nomoj kaj de temoj, enhavotabelo, korektendoj kaj aldonendoj, dum aparta folio listas „postkorektojn”.

Post preparolo de la enhavo, decas diri ion pri la formo. De Waringhien ni ĉiuj atendas ĝuindan lingvaĵon, kaj neniu trompiĝos, eĉ se pri kelkaj aferoj la opinioj restos malsamaj, ĉu pri „-ita- -ata” aŭ pri alia gramatika detalo. Eĉ se mi serioze klopodas kompreni la alian starpunkton koncerne la pasivajn participojn, mi devas meti demandosignon ĉe esprimoj kiel: „... E. iĝis, se ne oficiala malpermesata, tamen praktike sufokata”. Laŭ mia gusto W. trouzas „*da*”, ekz. (p. 114) „sistemo *da* afiksoj”, (p. 220) „tri grupoj *da* verkoj”, (p. 251) „tabelo *da* - 92 *da* fenomenaj vortoj”, (p. 307) „en la pli granda nombro *da* lingvoj”, (p. 420) tri kategorioj *da* klientoj”. Trouzo de *ig* ŝajnas al mi „*rompigi*” (p. 266/-5) kaj „*motivigoj*” (p. 420/5). Mi plezure konstatis dufoje *ig* - 92 uzon de „*far*” (p. 62 kaj 314) (apud *de, fare de kaj far' de* en aliaj kazoj), ankaŭ kelkfoje uzon de „*po*” laŭ tiu kontraŭfundamenta senco kiu jam antaŭlonge fariĝis kutima, sed ne plu troviĝas en PV: (p. 223) „0,02 (resp. 0,9) *po* mil vortoj” (p. 230) „*po*-centa ofteco”. La aŭtoro estas tre erudicia; fremdlingvajn citaĵojn mi povas kompreni en nur kvino *da* lingvoj; malĝustaĵojn en la aliaj lingvoj mi do ĝenerale ne povas konstati. Krom kelkajn simplajn pres- kaj skriberarojn jam notitajn, mi trovis ke la propozicio afrikansa „*ek het fer Jan gesé*” (a) estas malĝuste skribita („*ek het vir Jan gesé*”), (b) havas alian signifon (nome: mi *diris* [tion] al Johano), kaj (c) tial ne liveras ekzemplon de objektormfemo prepozicia. Tamen, estas vere ke la afrikansa havas objektormfemon prepozician. La frazo „*ek het vir Jan gesien*” havas ĝuste la signifon atribuitan al la malĝusta frazo supre citita (p. 132/2).

Superflue diri ke mi varme rekomendas ĉi tiun esperantologian „testamenton” de samideano Waringhien al ĉiuj kiuj, ĉu pro amo, ĉu pro malamo, ĉu pro nura scivolo, interesiĝas pri Esperanto kaj pri la internacilingva afero entute.

W. P. Roelofs.